

## Zamenhof-tago en Kroatio

*Je via sano, Samideanoj!* Per tiuj vortoj tostis kroataj esperantistoj, tintigante la glasojn kun speciala „Zamenhof-taga vino” kiam ili kolektiĝis por festi kune la 125-an datrevenon de E-o, kaj la plej gravan festotagon de E-ujo: la Zamenhofan tagon kiu samtempe estas la tago de E-a kulturo kaj de E-a libro. La festo okazis en Varaždín, Bjelovar, Rijeka kaj Zagreb.

En Varaždín, okaze de Zamenhof-tago E-societo „Božidar Vančik” organizis prelegon kaj ekspozicion pri Tibor Sekelj en Urba biblioteko „Metel Ožegović” kie prelegis Spomenka Štimec al 19 ĉeestantoj.



En Zagreb, Etnografia muzeo kaj Kroata E-Ligo invitis esperantistojn kaj neesperantistojn okaze de 100-a datreveno de naskiĝo de la esperantisto, verkisto, donatoro kaj mondvojaĝanto Tibor Sekelj al prezentado de la libro kaj tiurilata ekspozicio: *Tibor Sekelj – Aliaj homoj kaj landoj*.

Pli ol 60 personoj el diversaj E-societoj kolektiĝis en la prestiĝa zagreba Etnografia muzeo por ĉeesti la lanĉon de nova libro de Tibor Sekelj. Judita Rey-Hudeček, prezidantino de KEL, adresis la publikon, pri la verkisto parolis Damodar Frlan kaj Spomenka Štimec.

En Rijeka okazis renkontiĝo de rijekaaj e-istoj en la societejo de E-Societo Rijeka. Pri la vivo de L.L. Zamenhof parolis prezidantino Nataša Batistić kaj versojn de Zamenhof deklamis Vjekoslav Morankić.

La plej amasa festado de Zamenhof-tago okazis en Bjelovar [vd la foton] kiun iniciatis kaj realigis Bjelovara Esperantista Societo kunlabore kun du aliaj regionaj societoj: Dokumenta E-Centro el Đurđevac kaj E-societo Estonteco el Križevci. Ili estas ankaŭ membroj de UPE – Unuiĝo de Prelegantoj de E-o el Zagreb. Aparte gravis la kunlaboro de Kroata Fervojista E-Asocio el Zagreb.

En Popola biblioteko „Petar Preradović” okazis 3 ekspozicioj: „La vivo tra objektivo” de e-isto Ivica Šćepanpvić, „Dudek numeroj de la revuo Zagreba Esperantisto”, obstine aperanta ekde 2007, kaj „La mondo estas mirinda ĝardeno” en kiu la bjelovaranoj prezentis ĉirkaŭ 120 gratulkartojn, ricevitaĵojn de e-istoj el la mondo kiel reagon al propra festado de Zamenhof-tago. El la riĉa programo mi menciis la salutparolon de Franjo Forjan, la recitadon de lernantoj „Al la fratoj”. Zdravko Seleš recitis la poemon de bjelovara poeto-esperantisto Željko Sabol: „Manringo de mia morta patrino”, kaj la poemon de Tibor Sekelj: „La sango min pelas”. Prezenta estis ankaŭ la nova libro de Zdravko Seleš, titolita „Songoj kaj ombroj” kiun li verkis en tri lingvoj: la kajkava dialekto, la norma kroata kaj E-o. Feste parolis Josip Pleadin kaj Radenko Milošević. Radenko Milošević konigis al la ĉeestantoj ke Unuiĝo de zagrebaj e-istoj donacis al Dokumenta E-Centro la sumon de 1000 eŭroj por aĉeto de moderna kopia- kaj skanaparato pro la bezonoj de modernigo de DEC.

La programon sponsoris malavare la urbestro de Bjelovar kiu kun belaj vortoj salutis la ĉeestantojn, kaj ankaŭ aro da pliaj sponsoroj.

Por ĉiuj gastoj estis organizita antaŭtagmeza lunĉo kaj kafo, kaj posta abunda tagmanĝo post kiu sekvis danco kaj kanto akompanata per muziko de la ensemblo de Ĉeĥa Komunumo. La loka gazeto „Bjelovarac” anoncis la aranĝon en sia decembra numero, ekipo de televidaj filmistoj filmis ĝin.

La osijeka veterana esperantisto Aleksandar Kocian donacis al ĉiu gasto la libron „Božji robovi”. Oni ricevis ankaŭ specialan E-an kantareton, katalogon de foto-ekspozicio, kelkajn numerojn de „Zagreba Esperantisto” kaj bildkartojn de Bjelovar. Tre granda kaj memorinda festo.

*Marija JERKOVIĆ (Kroatio)*